Nun montriĝas, ke ni tamen erare prijuĝis la patron Otto von Medvey kun la filineto Undine. En la „Hamburger Illustrierte", jurnalo de la 29a de majo 1943a, do dum la milito, vi povas legi kaj laŭ fotoj konstati, ke tiuj samaj „kompatindaj viktimoj", Otto kaj Undine von Medvey ne hezitis aktori en Germanio por la frontsoldatoj. Kion ili fakte faris ĉe ni antaŭ la milito? Ĉu ili jam estis elsenditaj por spioni por la germana registaro?
D.K.

LA DANAJ ESPERANTISTOJ HELPAS NIN

Jam alvenis en Roterdamo du sendaĵoj da manĝaĵo de niaj k-doj kaj samideanoj en Danio por la Holandaj Esperantistoj. De el R-damo ni sendis la varojn al konataj adresoj en diversaj urboj kaj estis tre verŝajne, ke nun (ĉe la apero de ĉi tiu numero de L.E.) jam pli ol 600 esperantistoj ricevis paketon. En Roterdamo la entuziasmo pri tiu pruvo de solidaro ĉe la danaj esperantistoj estas tre granda, kaj tio estas komprenebla. Malgraŭ tio, ke ni en Nederlando ne plu malsatas, tamen la granda helpagado de niaj danaj amikoj per tio ne perdas sian signifon, nek sian valoron. La danoj helpis nin tuj kiam al ili eblis tio kaj ili helpis plej malavare, ĉar estas mirinde, ke tiom malgranda movado sukcesis kolekti tiom da varoj. Povas esti, ke eĉ venos tria sendaĵo, kiun ni volonte sendos al tiuj urboj en Nederlando, kiuj ankoraŭ ne ricevis ion.
Apartan dankon meritas nia k-do Paul Neergaard, la simpatia organizinto de la SAT-kongreso en Kopenhago, kiun sendube multaj el ni ankoraŭ memoras same kiel ili memoras la neforgeseblajn tagojn tuj antaŭ la milito en la bela ĉefurbo de Kopenhago. Estis D-ro Paul Neergaard, kiu aranĝis la tutan helpagadon en Danio kaj estas tre verŝajne, ke ankaŭ la iniciato estas de li. Ankaŭ per tiuj ĉi linioj ni volas danki kaj komplimenti lin kaj plie ĉiujn amikojn, kiuj montris tiom da „translima" helpemo. Via agado profunde impresis nin.

BAS WELS.

WIE HELPT?

onze oficisto aan een woning in Amsterdam, zo nodig met woningruil Utrecht, of de Federatie aan een woning met magazijn en kantoor, ook eventueel met vergaderzaal, in Amsterdam? Elke mogelijkheid of combinatie en/of winkel, zo mogelijk in het Centrum van Amsterdam wordt gaarne overwogen.

FED.BESTUUR.

FEDERACIA BUDĜETO

pri la lasta duonjaro 1945.

Enspezoj.

Kotizo pri 2000 anoj ..	ƒ 3000.—	
Profito L.S.	„ 500.—	
Elspezoj.		
Lab. Esperantisto (kun ekspedo k.t.p.)		ƒ 1800.—
Afranko		„ 130.—
Kontorbezonajoj		„ 250.—
Kongreso		„ 400.—
Libro-kontrolisto		„ 75.—
Propagando		„ 125.—
Oficisto (kaj asekurajoj) (4 monatoj)		„ 720.—
	ƒ 3500.—	ƒ 3500.—

Rimarko: La elspezoj estas taksitaj laŭ la meza sumo de la jaroj 1937-38-39 kaj 40, kaj iom plialtigitaj por tiuj elspezoj, kiuj verŝajne estos iom pli altaj; ekz. por kontoraj bezonajoj, de kiuj ni perdis multajn sekve de la milito.

Korekto.

En la poemo „Mi estis batalanto" de A.K. oni legu la 8an linion: „Sub fera boto de giganto". (do ne „bato"). Vidu L.E. numero 3 de Aŭgusto, paĝon 12, kolonon 2.

STEMMENTAL CONGRES 1945.

De afgevaardigden brengen zoveel stemmen uit als hun afdeling per ledenlijst aangeeft op 1 September j.l. Algemene leden hebben elk 1 stem. Eventuele onjuistheden geve men schriftelijk in 't congres op. (De cijfers tussen haakjes geven het stemmental congres 1940).

Amsterdam I	42	(75)
„ II	21	(36)
„ III	43	(46)
„ IV	25	(44)
„ V	73	(112)
„ VI	24	(35)
„ VII	42	(61)
„ X	56	(91)
„ XIII	41	(48)
„ XIV	12	(14)
„ XV	26	(37)
„ XVII	20	(16)
Rotterdam I	43	(83)
„ II	114	(143)
„ III	37	(49)
„ IV	52	(63)
„ V	45	(69)
„ VI	27	(25)
„ VII	27	(29)
Alblasserdam	11	(14)
Alkmaar	30	(39)
Almelo	7	(11)
Amersfoort	37	(43)
Andijk	9	(7)
Apeldoorn	11	(25)
Arnhem	25	(51)
Assendelft	11	(8)
Beverwijk	12	(24)
Bussum	14	(14)
Delft	25	(46)
Deventer	32	(39)
Dordrecht	23	(25)
Eindhoven	14	(15)
Emmer Compascuum	9	(5)
Enschede	33	(33)
Gent	8	(23)
Goes	3	(—)
Gouda	47	(41)
Groningen	73	(68)
Den Haag	108	(333)
Haarlem	111	(136)
Halfweg	11	(12)
Heerlen	33	(25)
Heerlerheide	15	(8)
Heilo	13	(25)
Hengelo	18	(14)
Hoorn	21	(12)
Koog a/d. Zaan	16	(26)
Krimpen a/d. Lek	12	(10)
Leeuwarden	43	(60)
Leiden	27	(24)
Nijmegen	17	(17)
Oostvoorne	12	(14)
Schagen	15	(21)
Schiedam	47	(39)
Sliedrecht	16	(30)
Stadskanaal	14	(18)
Terneuzen	15	(17)
Utrecht	30	(49)
Vaals	6	(11)
Vlaardingen	13	(13)
Vlissingen	8	(29)
Waubach	8	(10)
Westzaan	14	(14)
Willebroeck	6	(8)
Winterswijk	8	(11)
Wormer	9	(10)
Wormerveer	21	(18)
Zaandam	54	(45)
Zuilen	26	(25)
Zwolle	30	(44)

Van twaalf afdelingen mochten we nog geen ledenlijst ontvangen. Zij komen in deze opgave niet voor. Hun afgevaardigden dienen zo nodig nog een ledenlijst in op het congres. Deze moet door voorz. en secr. getekend zijn.

PRAVIS HITLER . . . !?

En la januara n-o (1995) de **SAT-Amikaro**, aperanta en Paris, troviĝas raporteto, kiu, miaopinie, indas esti komentata. Temas pri renkontiĝo, kiu okazis en la ĉefurbo de Francio, en la jaro 1942-a, inter germana soldato kaj du Paris-anoj. Iun tagon, ĉi tiuj lastaj promenis enurbe kaj havis verdan stelon ĉe butontruo de sia vesto. Tial la germano alparolis ilin, dirante: „Saluton s-anoj! Ĉu vi estas burĝaj aŭ laboristaj esp-istoj?" Surprizite sed senhezite la du k-doj respondis: „Ni estas SAT-anoj!" (Anoj de **Sennacieca Asocio Tutmonda**). Tiam la okuloj de la germano ekbrilis pro ĝojo kaj li aldiris: „Ankaŭ mi estis SAT-ano ĝis la ekrego de Hitler. . . ." Li parolis flue Esperanton, kaj klarigis, ke en la urbo, kie li vivis, neniam la tieaj k-doj ĉesis kaŝe kunveni, por buŝe praktiki la lingvon. Sed mi citu laŭvorte el la raporto:

„Kiom ĝojiga estis la konatiĝo! La tutan tagon ni promenis tra la urbo kaj vespere tre malagrabla estis la disiĝo. Sed li promesis viziti nin hejme iun vesperon, kaj fakte li venis. Denove ni babilis vere intime, kamaradece, fratece. Poste li sendube foriris el Paris, ĉar ni ne plu vidis lin. . . . Kie ĉi estas nun, frato. . . .?

„. . . . Fakto estas, ke post dek jaroj da blanka teroro, iu SAT-ano el S. . . . . . apud Rejno, parolas pli flue la lingvon ol multaj el ni kaj pensas pli **sennaciece** ol iuj „esp-istoj". Tial mi volas tuj saluti kaj gratuli la SAT-anojn el Germanio kaj aliaj landoj blankaj, kiuj konservis malgraŭ ĉio nian idealon en la profundo de sia koro. — Andreo."

Kredeble legantoj pensos, ke tia fakto ne kongruas kun la titolo de ĉi tiu artikolo. Klarigcele mi do konigu, kiel Hitler praviĝis la malpermeson je propagando kaj instruado de Esp-o en Germanio. Tiam estis publikigita interalie jeno:

„**La PRAKTIKADO de sennacieca lingvo KUN EKSTERLANDANOJ povas nur difekti la nacieca senton ĉe ties PRAKTIKANTOJ**".

Jes ja, tiel estas, kiel pruvas la ĉi supre raportita fakto. Cetere, mi povus mencii aliajn el mia propra sperto. Sed eble sufiĉos, ke mi senhonte konfesu, ke lastatempe, kiam mi legis, ke Kioto, Nara k.a. urboj japanaj, kiuj entenas artajn trezorojn kaj kie mi havas geamikojn, estis b o m b a r d a t a j, tiam mi spertis la saman ĉagrenon, kiel antaŭe ĉe la ekscio, ke francaj urboj estis bombe detruitaj. Per mia longdaŭra praktikado de Esp-o kun homoj el plej diversaj mondpartoj mi sekve perdis ĉian naciecan senton kaj akiris ian patriotismon planedan.

Ĉie en la mondo estas bonaj kaj malbonaj homoj. Kaj la nacieca patriotismo povas fari sovaĝan beston eĉ el plej bona homo. Pri tio tre tipa estas la angla moto: „Right or wrong, my country", kio por angla patrioto signifas, ke li defendas sian landon, ĉu ĝi pravas aŭ malpravas.

Nu, se fakte Hitler pravis en sia opinio pri praktikado de sennacieca lingvo, tio signifas, ke ĉiuj liaj kontraŭuloj malpravis, malatentante la Esp-an aferon. Kaj mi firme konvinkiĝis, ke ĉiuj homoj, kiuj ne praktikadas Esp-on, havas sian parteton da respondeco en la milito. Ili kvazaŭ konsistigas naciecan paston, kiun knedas regavidaj politikuloj. Kaj tiel ebliĝas, ke diverslandaj patriotoj interbuĉiĝu.

Necesas ja penadi por seniĝi sin je nacieco kaj tiel atingi nuran sentkapablon homecan, se oni sincere volas agadi efike por starigo de daŭra paco en la mondo.

Kiu ne lasas sin trompi per bombastaj frazoj de regnestroj kaj diplomatoj, tiu povas klare konstati, ke la nunaj rilatoj inter la „unuiĝintaj nacioj" jam entenas m u l t a j n ĝermojn de malpaco, kiuj kreskos ĝis okazigo de tria mondmilito. Tial por mi fariĝis kvazaŭa aksiomo tio, kion mi jam diris en RENOVIGO antaŭ tri jaroj, kaj ne laciĝos ripeti:

„Esperi daŭran pacon inter nacioj, estas same malsaĝe, kiel celi bonfarton per englutado de veneno: la nacieco ja venenas la homaron".

Meks, Jul. 45. E. LANTI.

(El „Renovigo", Meksiko, Aŭgusto 1945. Red.).

BESTUURSMEDEDELINGEN

Het Congres.

Het 26e congres vindt plaats op 6 en 7 October a.s. in gebouw „de Leeuw" Valkenburgerstraat, in het centrum van Amsterdam.
Voor bijzonderheden verwijzen wij o.a. naar de mededelingen in de vorige L.E. en in „Interkontaktilo" van September, No. 2.
De congreszaal wordt om 13 uur geopend. De afgevaardigden die nog iets met het bestuur wensen te bespreken, hebben daartoe in het congresgebouw de gelegenheid van 14 tot 17 uur. De eerste zitting vangt aan Zaterdagavond om 19.30 uur, Zondagmorgen om 10 uur de tweede zitting.

Afrekening aan de afgevaardigden.

Daar, door de geldsanering, het mogelijk is, dat onze penningmeester niet over voldoende geldmiddelen beschikt, verzoeken we de afgevaardigden hiermede eventueel rekening te houden.

Libro-Servo.

We zijn er eindelijk in geslaagd de nodige voorzieningen te treffen om een geregeld verloop te kunnen verzekeren. Inmiddels is echter een grote achterstand ontstaan, die nu evenwel meer en meer wordt verwerkt. Onze oficisto, k-do Degenkamp, heeft inmiddels zijn werkzaamheden aangevangen.
Hoewel alles wat kantoor en magazijn betreft nu geregeld is, mogen wij evenwel niet uit het oog verliezen, dat een en ander een voorlopig karakter draagt.
Wij hopen t.z.t. die maatregelen te kunnen treffen, welke aan de L.S. de nodige zekerheid van woning en outilage zullen verschaffen. Zij, wier bestellingen nog niet werden uitgevoerd, kunnen deze binnenkort tegemoet zien.
We doen een dringend beroep op onze afdelingen om ons van pakpapier te voorzien, daar het anders in de nabije toekomst niet mogelijk zal zijn de verzendingen te verzorgen. Of is er iemand onder onze leden, die ons weet te helpen met de aankoop van een behoorlijke voorraad?

Propagandaplaat

Aan al onze afdelingen is een kwantum propagandaplaten toegezonden.
De prijs van de plaat is 15 cents per stuk. De afdelingen, die onverhoopt deze platen nog niet ontvangen hebben, worden verzocht dit onverwijld aan ons adres op te geven. Wegens de papierschaarste moesten wij de oplaag echter beperken. Wij vertrouwen dat zij hun weg wel vinden en zonder uitzondering overal op de juiste plaatsen hun werk kunnen doen voor de propaganda, en ons een rijke oogst voor de cursussen bezorgen.

Novaj membrolistoj.

La novaj membro-listoj jam estas dissendataj. Por faciligi nian laboron la sekciaj sekretarioj bonvolu atenti jenajn dezirojn niajn.

1. Ĉiam aldonu la antaŭnomojn (litere).
2. Se estas ino, ne forgesu mencii tion.
3. Por ĉiu ano oni uzu kolonon (ankaŭ por edzinoj).
4. Nepre aldonu la propran nomon de la ino, se temas pri geedzoj.
5. Prefere oni skribu la geedzajn parojn plej laste sur la listo, cetere oni atente legu la komunikojn sur ĝi.

Jam antaŭe nian dankon.

Ricevitaj donacoj

Danke al la donacintoj ni ĉi sube kompletigas la raporton aperintan en L. E. numero 3, paĝo 14.
P. de Bl., Hoek (Zld.) ƒ 10.—; A. H., Eibergen, ƒ 10.—, M. P. B., Baarland (Zld.) ƒ 15.60; sekcio Eindhoven ƒ 15.50; sekcio Heerlerheide ƒ 116.20 kaj sekcio Schagen ƒ 17.—.
Kun la antaŭe menciita sumo de ƒ 414.82, entute ƒ 599.12.

Abonnement L.E.

De abonnementsprijs voor L. E. is vastgesteld op ƒ 1.75 per jaar.

Volgend L.E.

verschijnt zo mogelijk 27 October.
Copy voor dat nummer gelieve men ons vóór 15 Oct. te doen toekomen.

LA HAGA, S.A.T. RONDO

devove funkcias. Jam kelkaj malnovaj aktivuloj anoncis sin ĉe la peranto k-do Varkevisser, Zandvoortstraat 11, Scheveningen.
Ni esperas, ke ĉiuj antaŭaj S.A.T. anoj, kiuj transvivis la kvinjaran amasmurdon, ree ne nur membriĝos, sed aktive partoprenos la farotan laboron. Jam la internacia kampo starkiĝis, ne nur per larmoj kaj sango, sed por la postvivantoj ankaŭ per spertoj. Precipe rilate al la lingva problemo.
Ĉiu esperantisto scias, ke Esp. estus vana, sen intern. kontakto kaj interrilatoj. Ni do plenumu la farendan taskon. V.

Esperanto-examens

Voor de Esperanto-examens A. en B., die plaats vinden op Zondag 21 October a.s. in Amsterdam, en Zaterdag 27 October in Den Haag, geve men zich op vóór resp. 1 en 8 October bij het secretariaat van de Algemene Nederlandse Esperanto Examen-Commissie, mej. H. M. Mulder, Zilvermeeuwstraat 29, Badhoevedorp. Prospectus wordt op aanvraag gratis toegezonden.

Kandidatoj por la estraro.

La malnova estraro, escepte de k-do A. Lafeber, kiu pro familiaj cirkonstancoj ne povas akcepti novan kandidatigon, estas reelektebla. Krom la antaŭaj estraranoj partoprenis en la antaŭpreparaj laboroj k-doj Schoonenberg kaj Veldhove, kiuj same pretas akcepti elekton.

Konkludo de la honoriga komitato.

Konsidere al la favoro de la Federacio la fed. estraro opiniis dezirinde peti al findindaj k-doj esploron pri la sinteno de k-do F. de Vries, ano de la fed. estraro, kies iama aneco de N.A.F. necesigis la esploron, ĉu nomita k-do povas esti konsiderata kiel politike kaj ĝenerale fidinda.
Ĉi tiu komitato, konsistanta el k-doj H. W. Alings, Jac. Lem kaj W. H. van Lier, venis post detala esploro al jena konkludo:
La komitato,
sciiĝinte pri la skriba atesto de atestanto kaj la skriba defendo de k-do F. de Vries, aŭdinte ambaŭ k-dojn, opinias, ke en la „afero de Vries", nur temas pri lia N.A.F.-aneco dum ĉirkaŭ unu jaro, ĝis meze de 1943a kaj lia propagando ĉe liaj kolegoj por tiu organizo.
La komitato,
konsiderante, ke k-do F. de Vries ĉiam favore laboris por nia Federacio;
ke lia sindikato plene fidas k-don F. de Vries, kio montriĝis per la fakto, ke li senskrupule estas akceptita kiel fakgrupa estrarano;
kvankam bedaŭrante lian sintenon, (kiun ĝi malaprobas) rilate al N.A.F., tamen konkludas, ke k-do F. de Vries estis kaj estas plene fidinda, tiel ke ne ekzistas motivoj por malrajtigi lin funkcii kiel federacia estrarano.

La komitato supre nomita
(subskribis) H. W. ALINGS.
W. H. v. LIER.
JAC. LEM.

LA SUBAKVIGO DE WALCHEREN

(En la komuna klubgazeto de niaj sekcioj Amsterdam 7a kaj 15a „Esperanto Venkos" ni legis artikolon de nia konsilantarano k-do Houtekamer el Souburg — vilaĝo sur la insulo Walcheren — kies enhavo meritas pli vastan legantaron, kaj sekve aperas ĉisube. Red.).

La kalendaro montris la 2an de oktobro 1944a. Estis la tria kaj mi funkciigis la radioaparaton por aŭskulti Anglion. La aparaton ni havas kaŝe en la fabriko. Jen subite aŭdiĝis:
„Averto al la loĝantaro, kiu loĝas apudborde de Skaldo (Schelde). Forlasu kiom eble plej baldaŭ viajn loĝolokojn. Se eblos al vi, foriru el Zelando aŭ vi iru al la plej altaj lokoj de Walcheren, ĉar estas eble, ke la germanoj subakvigos la insulon. Laboristoj de elektro-farejoj kaj gasfabrikoj, vi tuj forlasu viajn laborejojn."

Ĉar mi laboris en gasfabriko en Vlissingen, mi tuj iris al miaj kamaradoj kaj rakontis, kion mi jus aŭdis. Ni interkonsentis foriri. Tuj poste aŭdiĝis la alarmsignalo. Ni mire rigardis unu la alian kaj interdemandis: ĉu jam nun? Sed aperis nur du aviadiloj kaj ili faligis dekmilojn da flugfolioj, sur kiuj ni legis la averton, aŭditan per la radio. Ĉar ni jam multfoje spertis la teruraĵojn, kiuj jam okazis sen averto, ni ne plu dubis kaj tial adiaŭis unu la alian per manpremo, dirante: „ĝis post la milito". Per tiuj vortoj ni celis: „Post la liberigo de Walcheren".

Mi ne kuraĝis resti en mia hejmo en Souburg, ĉar la germanoj kompreneble ne toleros, ke la fabriko ne plu funkcias. Mi do iris kaŝi min en Middelburg kaj mia edzino kuniris. Cetere tamen konsilindis foriri, ĉar en la domo flanke de nia loĝis germanoj, kiuj pretigis ĉion por eksplodigi tiun domon. La sekvintan tagon, tagmeze je la unua aŭdiĝis la alarmsignalo. Aperis multe da aviadiloj, kiuj bombardis la faman digon apud Westkapelle. La sekvo estis, ke parto de Walcheren subakviĝis. La homoj, kiuj loĝis tie, devis forkuri al aliaj lokoj. Kelke da tagoj poste oni denove bombardis la digon kaj pli da akvo enfluis. La vilaĝo Westkapelle malaperis, parte pro la bomboj, parte pro la akvo. Multaj homoj mortiĝis en tiu ĉi loko. En ŝirmejo tuj apud la digo, troviĝis kvardek du homoj, kiuj pro multeco, devis stari premite unu kontraŭ la alia. Subite entorentis la mara akvo kaj malebligis al la homoj savi sin. Ili ŝirmis sin kontraŭ la bombopecoj kaj terure mortiĝis pro la akvo. Nur du sukcesis savi sian vivon; la aliaj dronis staranataj. Krome centoj mortiĝis pro la bomboj.

Intertempe multaj viroj vane klopodis fari provizorajn digojn por haltigi la fluon de la akvo, dum kiam la „nobelaj" germanoj ĉasis je ili por kapti ilin.

La 7an de oktobro, sabaton posttagmeze aperis multege da aviadiloj kiuj i.a. per 6000 kilogramaj bomboj bombardegis la digojn apud Vlissingen, Ritthem kaj Veere. Tio daŭris kelka da horoj, dum kiam la tero de tuta Walcheren tremegis. Ĉie vidiĝis aviadiloj, kien ajn oni rigardis. La homoj amasiĝis kaj demandis: Kio nun okazas?" Nu, ni baldaŭ rimarkis, kio okazas. Pli da akvo enfluis; preskaŭ la tuta insulo subakviĝis kaj baldaŭ la akvo aperis en la stratoj de Vlissingen kaj Middelburg. Nur malgranda parto de la insulo restis seka, ĉar ĝi estas ĉirkaŭita per digoj.

En tiuj tagoj la homoj laboregis por savi la brutaron kaj la havaĵojn. Oni metis la meblojn sur la subtegmentejon kaj poste forlasis sian domon. Multaj volis iri al Zuid-Beveland, sed tio ne plu eblis, ĉar la ununuran vojon al Z.B. oni bombardadis kaj dum la tuta tago flugis super ĝi la aviadiloj, kiuj pafis al ĉiu, kiu kuraĝis iri sur la vojo.

La homoj do estis devigitaj serĉi rifuĝejon en Middelburg, en kiu urbo oni povis loĝi nur en la centra parto pro la akvo. Miloj da homoj rifuĝis en tiun urbon kaj loĝis tie dek-, dudek-, aŭ trikdekope en unu domo, sen elektro, gaso kaj akvo, ĉar ankaŭ la akvokundukilo ne plu funkciis. Krome ankaŭ niaj germanaj protektantoj devis loĝi en Middelburg, pro kio ni vivis kiel haringoj en barelo dum kelke da monatoj.

La 1an de novembro albordiĝis la liberigontoj en Vlissingen kaj West-Kapelle. Tri tagojn oni batalis en Vlissingen kaj tiam komenciĝis la pafado al Middelburg. Tio daŭris tri tagojn kaj noktojn, dum kiu tempo la germanoj tute ne kontraŭstaris. Ankaŭ ili, same kiel ni, restis en la keloj. Kial do tiu freneziĝa pafado, kiu mortigis multajn kaj detruis sennecese? Eĉ nokte oni faligis bombojn sencele.

Fine la 6 an de novembro je la kvina Middelburg estis liberigata de kelke da „tankoj".

(Finota).

† FUNEBRA KOLONO †

Aldone al la „Funebra Kolono", aperinta en L.E. de Augusto (paĝo 12) ni havas la malĝojigan devon aldoni la nomojn de

K-do G. Bexkens
fervora ano kaj aktiva S.A.T.-peranto de Amsterdam-X, mortis pro longdaŭra malsano.

K-do Jan Bisschop
ano de sekcio Antwerpen, mortis en germana koncentrejo, la 12an de junio 1944a.

K-do van Bronkhorst
ano de sekcio Hoorn, mortigita de la germanoj.

K-do H .M. Broekhuizen
aktivulo kaj prezidinto de sekcio Den Haag II, mortis en 1941.

K-do W. Bruin
iama kasisto de Amsterdam-V.

K-do van Greuningen
multpromesa komencanto, ano de Amsterdam-X mortis pro bombardo en Germanio.

K-do Ph. N. Heinze
ĝen. membro en Maarn, mortis post longdaŭra malsano.

K-do Frans Hies
aktivulo de sekcio Willebroek (Belgio), mortis pro bombo-atako en Germanio.

K-do Jans
ano de Amsterdam-X, mortis pro kaŭzo nekonata.

K-do J. Schaap
ano de sekcio Groningen. Liberigita de la Amerikanoj de el Germanio, li tamen pro tuta elĉerpiĝo kaj malsano poste mortis.

K-do P. H. Veltman
fervora ano kaj aktivulo en la sekcia teatraja grupeto de Amsterdam-X, mortis subite post dutaga malsano.

K-do G. J. Voogd
ano de Amsterdam-V.

Krome ni memoras la multajn gekamaradojn, pri kiuj oni nun ankoraŭ nenion scias, sed el kiuj multaj sendube neniam revenos, kaj mortis pro la kruelajoj fare de germanaj sadistoj. Ĉi tiu fakto montras la nerefuteblan neceson de ilia idealismo, kiu direktis sin al tutmonda humanismo kaj al mondpaco.

FEDERACIA ESTRARO.

INGEZONDEN

TUTMONDA JUNULAR-MOVADO.
In de kop van Noord-Holland komen we bij onze propaganda voor de Federatie telkens in botsing met leden en afdelingen van de Tutmonda Junular-Movado. De vraag is: moeten we als Federatie de T.J.O. erkennen als specifieke neutrale Jeugdorganisatie of niet? Natuurlijk hebben de jonge Esperantisten, indien zij dit wensen, recht op een neutrale organisatie. (Ik zelf ben een tegenstander van aparte Esperanto-organisaties naar politiek of geloof, waar het de jongeren betreft.) Ik geloof ook dat L.E.E.N. en de Federatie met zo'n organisatie zouden moeten samenwerken. Tegen T.J.O. zijn echter zeer ernstige bezwaren aan te voeren.
1e. De T.J.O. is geen democratische organisatie. Mevr. van Veenendaal-Bouwes zwaait er de scepter en trekt zich er zelfs niets van aan, wat haar mede-bestuurders besluiten, zij gaat haar eigen weg. Ook nu, na de oorlog, weer. „La Juna Vivo" wordt beschouwd als het orgaan van T.J.O., maar het is niet, zoals bij de organen van andere verenigingen, dat de redactrice rekening en verantwoording schuldig is aan de leden der organisatie. Het orgaan van de vereniging is dus een privé-aangelegenheid van één lid.
2e. De T.J.O. is zelfs geen jeugdorganisatie. De naam is, wat Nederland betreft, eenvoudig boerenbedrog. Iedereen, oud of jong, kan lid zijn, als je maar achter Van V. wilt aanlopen. Wil de T.J.O. dus waardering en erkenning der bestaande Esperantisten-vereniging verkrijgen, dan zal er eerst het een en ander moeten veranderen. Men zal het „leidstersprincipe" moeten prijsgeven en men zal een leeftijdsgrens naar boven moeten vaststellen zo, dat het werkelijk een jeugdorganisatie wordt.
Gelukkig is er in het bestuur een groep, die deze kant uit wil, maar of die groep haar zin zal krijgen? Ik geloof, dat het beter is, dat men een nieuwe T.J.O. opricht, zonder Mevr. v. V., want met haar is samenwerking op den duur toch niet mogelijk. Misschien gaat er dan weer een storm van verontwaardiging op, maar tenslotte zal men toch moeten erkennen, dat de Federatie gelijk had, toen ze zich ontdeed van iemand, die niet de organisatorische weg *kan* volgen.

W. BRAAKENSIEK.

Schoorl, 19 Sept. 1945.

Uit de afdelingen

AFD. ARNHEM
Secr.: Schuttersbergweg 61

La 25an de julio okazis la unua kunveno post la liberiĝo. Ĉeestis 23 gek-doj kaj nikonstatis, ke ĉiuj intencas entuziasme daŭrigi la Esp.-laboron. Nia sekcio nun nombras 25 anojn, do pri la komenco ni povas esti fieraj. Ĉar nia sekcio perdis ĉion, ekzemple la bibliotekon, propagandmaterialon, studlibrojn k.t.p., ni petas al aliaj sekcioj helpon, por ke ni povu propagandi.
En 1944a nia urbo nombris proksimume 100.000 enloĝantojn kaj nun post 9 monata evakuado 70.000 revenis, ĉar multege da domoj estas tute detruitaj.
K-do Henstra nun estas nia prezidanto, ĉar k-do Saaltink perdis sian domon kaj tutan havaĵon.
Pri la konversacivesperoj ni decidis dum la somero kunveni alternsemajne. Unue la 8an de aŭg. plue la 22an de aŭg., la 5an kaj 19an septembro en „Opbouw", Rosendaalschestraat (Paviljoen).

J. A. Lubbers, sekr.

AFD. DELFT
Secr.: v. d. Heimstraat 59

„La 28an de junio nia sekcio refondiĝis. Ni sukcesis lui la salonon Nieuwe Langendijk 5o, en kiu ni provizore ĉiujaŭdvespere kunvenas por konversacii kaj por refreŝigi nian scion pri la gramatiko. Bedaŭrinde nia biblioteko perdiĝis, sed ni tuj eklaboris por fondi novan, kaj dank' al libervolaj donacoj de nia anaro

tiu laboro plensukcesis. Tuj post la verda monato, en kiu ni okazigos propagandvesperon, la elementa kurso komenĉiĝos. Jam nun kelkaj personoj anoncis sin. Ni ankaŭ eldonas propran grupgazeton, por kiu ĉiuj anoj promesis sian kunlaboron. La nova plenuma estraro konsistas el jenaj anoj: Prez. H. W. Kardolus; Sekr.: W. de Roo; Kasisto: H. Bank. La sekcio havas 23 membrojn. Ni ĉiuj promesis kunlaboron, por ke „Nia Idealo Alta" kiel eble plej baldaŭ reakiru sian antaŭmilitan forton."

W. de Roo, sekr.

AFD. GOUDA
Secr.: Graaf v. Bloisstraat 30

La 30an de majo laŭ iniciato de kelkaj eksmembroj refondiĝis la Fed. sekcio „Ni persistu" kun 11 geanoj. La tiam elektita provizora estraro kun k-do W. van Heeren, prez., A. de Smit, sekr., kaj k-dino M. Broekhuizen, kas. laboris sur vasta bazo kaj sukcesis grandigi la sekcion ĝis 43 gemembroj sekve de la kunfondiĝo de la tri antaŭmilitaj grupoj, el kiuj unu ne apartenis al la Fed. pro la tiamaj konfliktoj, evidentiĝintaj eĉ en Rotterdamo kaj kelkaj aliaj lokoj. Tamen la milito instruis nin suriri aliajn vojojn. Eĉ la katolika grupo en Gouda volas kunlabori propagandterene.
La membrarkunveno je la 20a de julio elektis la nomon „Konkorde antaŭen". Kiel bago la Fed-aj statuto kaj regularo estis akceptataj. Ĝis oktobro okazos nur konversaciaj vesperoj kaj eventuale kelkaj ekskursoj. Por la verda monato jam elektiĝis propaganda komisiono, kiu tuj faros financajn preparojn. En oktobro refunkcios komenca, daŭriga kaj diploma A-kursoj, kaj, se eble, ankaŭ infankurso, por kiuj jam kelkaj anoncis sin. Por la difinita estraro elektiĝis k-doj A Hordijk, prez., W. J. v. d. IJssel, sekr.; P. v. d. Star, kas.; W. v. Heeren, bibl.; kaj B. Terlouw, asesoro. „Konkorde antaŭen" esprimis en ĉi tiu kunveno la volon iri konkorde antaŭen!

AFD. GRONINGEN
Secr.: Nachtegaalstraat 89a

Tuj post la liberiĝo de nia urbo, nia malnova estraro kaj kelkaj aktivuloj kunvenis por priparoli la restarigon de nia sekcio. Kelkajn momentojn ni rememorigis k-don Harry de Metz, nian prezidanton, pri kiu estas dube, ĉu li iam revenos (la germanaj sadistoj transportis lin al Polujo).
Provizora estraro estis elektata. Ni decidis, pere de aldoma vizito, instigi niajn malnovajn anojn denove aniĝi. Proksimume 80 pct realiĝis. Post tiam ankoraŭ 32 membroj anoncis sin. Nia sekcio nun nombras 72 anojn. Kune kun la neŭtraluloj ni partoprenis la demonstracion, okaze de la liberiĝo, kompreneble kun niaj flagoj. En nia unua membrokunveno oni kolektis 119.5 guldenojn por nia sekcio. Por la Federacio ni kolektis 101 guldenojn.
Ĉiun jaŭdon ni kunvenas je la 8a en "'t Prinsenhof", kie ni konversacias kune kun la neŭtraluloj, la kristanoj kaj la katolikoj. Gekamaradoj en ĉi tiu monato, „LA VERDA", ni ĉiuj laboregas, por ankoraŭ pligrandigi nian Federacion.

R. van Kempen

AFD. HALFWEG
Secr. Spaarnwouderweg 843, Vijfhuizen.

Post la fino de la milito ni restarigis nian sekcion kaj propagandadas Esperanton. Ni verkis artikolojn al la lokaj gazetoj, kiuj publikiĝis ilin. Ni organizis dum 2—9 septembro ekspozicion, kiu sukcesis. Ni havas la konsenton de la komunuma estraro por uzi la lokan lernejon por niaj kursoj, kiuj komenciĝis la 11an de septembro por infanoj kaj la 13an de sept. por komencantoj. La konversacia vespero okazas ĉiuvendredvespere ĉe k-do Maas, IJweg 136. Infangrupo „La Junaj Migrantoj" geknaboj 10—13jaraj, deziras korespondi kaj interŝanĝi illustritajn kartojn kun aliaj geknaboj; respondo garantiita. Skribu al la sekr.: Dirk van Rijn, Spaarnwouderweg 843, Vijfhuizen.

D van Rijn, Sekr.

AFD. HOORN
Secr. Keern 376

Nia sekcio rekomencis post longa tempo sian laboron. Ni enskribis 18 anojn kaj esperas, ke tiu nombro grandiĝos. Por refreŝigi la scion de la lingvo, ni starigis ripetkurson kaj komencan kurson.
Ni rememoris k-don van Bronkhorst, kiu estis mortigita de naci-manoj. Ni perdis tiu laboreman kaj bonan amikon.
La kunveno elektis novan estraron, resp.: Duursma, Presidanto; R. Sas, Sekretariino; L. Willeboer, Kasistino.

Afd. Den Haag.
Secr. Potgieterstraat 9.

Onze conversatie-avonden vragen de volle aandacht. Elke Dinsdagavond na de „refreŝiga kurso" genieten we van een aktueel onderwerp door een der leden ingeleid.
11 Sept. was de lezing bij k-do Valkenier omgezet in een pianoconcert. We maakten een muzikale reis door vele landen, waarbij k-do Valkenier met virtuositeit het internationale programma vertolkte. Hierop volgde nog een leerzame avond, waarvan de thuisblijvers alleen maar spijt kunnen hebben.
Maak onze conversatie-avonden tot het **levendige middelpunt onzer Haagse afdeling.** Zij zijn er voor **alle leden.** Ook de „sperluloj" kunnen hier hun tong los maken.

AFD. LEEUWARDEN
Secr. Marnixstraat 19.

Tuj post la liberiĝo, la antaŭ-milita estraro kunvenis por restarigi nian sekcion. Je la dekoka de majo ni unuafoje kunvenis en la „Gebouw van de Transportarbeiders, Oosterkade, la loko, kie antaŭ 15 jaroj ni ankaŭ estis por strarigi nian sekcion.
Kvar gazetoj: „Leeuwarder Koerier", „Het Parool", „Het Vrije Volk" kaj „De Waarheid" enpresigis niajn klubsciigojn.
En kunlaboro kun la Frisa Esperantista Rondo ni partoprenis en la procesio je la 13a de Septembro, Leeuwardena Nacia Festotago. La Esperanto grupo en tiu procesio prezentis grandegan verdan stelon, portatan de kvar diversnaciaj personoj kaj ĉirkaŭitaj de ok diversnacie vestitaj sinjorinoj. Antaŭ ĝi iris figuro: Paco kaj Esperanto; kaj ĉe la fronto iris profesoro, portanta grandegajn vortarojn kaj tabulon kun la vortoj: Nu kan ik met alle volken spreken. Lin sekvis junulo, portanta unumane lernolibron, kaj alimane grandan stelon kun la vortoj: Ik ook. La belguste aranĝita grupo vekis ĉies entuziasmon; kaj la lokaj jurnaloj menciis, ke ĝi ricevis ekstran premion.
Oni elektis la malnovan estraron: Prezidanton J. Tjepkema, Sekr-on C. H. Heiner, Kas-on A. Stellema, 2a Prez-on A. v. Dijk, 2e Sekrinon kaj libro-servantinon T. Brinkman.
La germanaĉoj kondamnis nian anon J. v. d. Kaa al la kuglo; por li la liberiĝo de la urbo Groningen kie li estis en malliberejo, venis ĝustatempe; kaj T. de Groot revenis ĉe sia familio tre malsana, post kvarjara restado en koncentrejo en Germanlando.

C. C. M. Rijpstra-Timmermans.

AFD. ROTTERDAM III
Secr. Ruwaardstraat 54 b (W)

Fine de julio rekreiĝis sekcio III Roterdamo. Ĉiuj ĉeestintoj, inter kiuj ne malmultaj novuloj aliĝis — 27 gekamaradoj — post kelkaj enkondukaj paroloj.
La estraro konsistas el la gekamaradoj. J. Bout, unua prezidanto, J. M. Timmerman, dua prezidanto. Jocq. V. Dupain, sekretario, Ruwaardstraat 54b, Rotterdam (West). K-dino P. H. Luijendijk, asesorino kaj k-do N. de Wilt, asesoro.
Ĉar ankoraŭ mankas multaj malnovaj anoj, ni instigas ĉiujn bonvole diskonigi nian restariĝon. Komence de septembro enregistriĝis jam 40 geanoj.
Ni provizore konversacias ĉiun ĵaŭdvesperon je la oka en la saloneto „Recht door Zee", Catharina Beersmansstr. 29, Rotterdam (W.).

Sekr.

AFD. ROTTERDAM VI
Secr. Zegenstraat 67 B.

La 20an de aŭgusto nia sekcio restariĝis. Dum tiu kunveno anoncis sin 27 anoj. Bona sukceso! La anoj elektis i.a. jenajn k-dojn: prezidanto F. v. Renn, Resedastraat 19 B; sekretario L. C. v. d. Hoek, Zegenstrat 67 B; kassisto D J. Lindthout, 1e Carnissestr. 22 B.
Gek-doj, vizitu ĉiam la klubvesperojn kaj klopodu fari ion. La kunvenoj okazos ĉiun lundon en la salono E.H.B.O., Wolphaertsbocht 70.

L. C. v. d. Hoek, sekr.

AFD. ZAANDAM
Secr. Franschestraat 17

Naast de groene-maand-propaganda en voorbereiding der cursussen vraagt ook het komende congres onze aandacht. In L.E. hebben we kunnen lezen, dat slechts een beperkt aantal kaarten voor iedere congres-zitting beschikbaar kan worden gesteld. Zij die graag het werk-congres willen bijwonen, geven zich de a.s. vergadering op.

Het Bestuur.

AFD. WILLEBROEK.
Secr. Appeldonkweg 37.

La 29an de aŭg. nia sekcio refondiĝis. Kelke da eksanoj ĉeestis, el kiuj oni **elektis** provizoran estraron:
Prezidanto kaj bibliotekisto: Van Saelen, J. Raportisto: Borghijs. R. Sekretario: Daelemans. C. La estraro instigis la ĉeestantojn regule ĉeesti niajn kunvenojn, kiel ili faris antaŭ la milito kaj precipe propagandi Esperanton dum la verda monato kaj varbi novajn membrojn por niaj sekcio kaj ideo.
La estraro decidis, ke la sekvonta ĝenerala kunveno okazos la 19an de sept. je la 19.45 horo ĉe nia prezidanto, k-do Van Saelen, J. Molenstraat 80, Willebroek.
La sekretario, Daelemans. C.
Appeldonkweg 37, Willebroek.

DISTR. ZUID-HOLLAND.
Secr.: Frankendaal 135, Rotterdam-Z.

La 12an de aŭg. ni kunvenis, kaj la kunveno estis vizitata de multaj gek-doj, la malbona trafiko ne multe malhelpis al la vizitado.
El la diskutoj klare montriĝis la laboremo kaj entuziasmo de la membroj. En kelkaj sekcioj venis petoj de intervenoj, ĉe la aranĝoj de kursoj. Ni klopodos helpi **ĉiel**, per kursgvidantoj kaj materialo.
Oostvoorne, Maassluis, Dordrecht kaj Alblasserdam jam petis kursgvidantojn. Ĉu ankoraŭ pli?
Ni esperas, ke anoncos sin sufiĉe da gek-doj por la gvidado. Sekci-sekretarioj, notu la adreson de la kasisto de la S.H.D. k-do J. v. Bezouwen. Mijnsherenlaan 110, Rotterdam (Z.)!

F. H. Koppenjan, Sekretario

La 16-an de aŭgusto mortis unu el la fondintoj de nia sekcio

k-do T. GOUDBEEK

Dum 16 jaroj li estis nia kasisto; ni perdis unu el la plej fidelaj membroj kaj ne forgesos lin.

Sekcio Zwolle F.L.E.

FLORMAGAZENO „Belflora"
Koningstraat 481V - DEN HAAG
*
Liveras ĉiajn bukedojn k.t.p.
Esperanto parolata.

DRUK. DICO, AMSTERDAM